# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo januaro 2017**


## PREZENTO EN LA INSTITUTO CERVANTES

Kiel anoncite, la 15an de decembro, en la Internacia Tago de Esperanto, Hispana Esperanto-Federacio publike prezentis la elektronikan eldonon de la traduko al Esperanto de "La inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha" en la sidejo de la Instituto Cervantes en Madrido.

La evento estis enkondukita de la direktoro pri kulturo de la Instituto Cervantes, Beatriz Hernanz, kiu salutis en Esperanto kaj faris mallongan prezenton de la lingvo kaj de D-ro Zamenhof. Poste, paroladis José Antonio del Barrio, prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, Miguel Gutiérrez Adúriz, kunordiganto de la projekto de bitigo de la verko, kaj Ana Manero, respondeculo de la Bitoteko de HEF. Manolo Parra, prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo, legis pecon de la verko, unue en la hispana kaj poste en Esperanto. Fine, HEF donacis pakon da libroj en Esperanto al la biblioteko de la Instituto Cervantes.




Oni anoncis ankaŭ ke de tiu tago la eldono estas disponebla en la Elektronika Biblioteko de la Instituto Cervantes. Ligilojn oni povas trovi per la adreso http://www.esperanto.es/quijote.

## ZAMENHOFA VESPERMANĜO

Post la prezento en Instituto Cervantes, ĉ. 17 esperantistoj celebris la Zamenhof-feston per kuna vespermanĝo la 15an de decembro en vegetarana restoracio Artemisa.



## ALIA UNIVERSALA QUIJOTE

Kiel anoncite, la 12an de decembro, en la sidejo de la Nacia Biblioteko de Hispanio, en Madrido, estis prezentita la verko "El Quijote universal", kun traduko de diversaj ĉapitroj al dekoj da lingvoj. Ĉe la prezentado oni legis pecojn en du dekoj da lingvoj. La tutan aktivaĵon oni povas spekti en la reto, ĉe: https://youtu.be/sdojVVGQHps. La pecon en Esperanto legis la prezidanto de HEF, José Antonio del Barrio (minuto 55:30 de tiu video)

## VIZITIS NIN

La 4-an de decembro vizitis la sidejon de MEL nia samideano el Leono, Ignacio Cancelo.

Dum la semajno de la Zamenhof-tago vizitis Madridon pro laboraj kialoj Simon Varwell, skoto el Inverness. Li akompanis nin dum la ĵus menciitaj agadoj, en la Nacia Biblioteko, la Instituto Cervantes kaj la Zamenhofa vespermanĝo. Ankaŭ akompanis nin dum la 15-a de decembro lernanto el Usono, Kurt, kiu laboros dum pluraj monatoj en nia urbo.

En la lasta duono de la monato restis en Madrido, kun familio, niaj amikoj el Malago, Ángel Arquillos kaj Mariló Torres. Ili vizitis la sidejon la 19-an de decembro, kaj rendevuis kun aliaj esperantistoj en aliaj tagoj.

## AGENDO POR FEBRUARO

Ni memorigas ke ni ĵus eniris la Jaron Zamenhof, en kiu oni kunmemoras la 100-an datrevenon de la morto de Lazaro Zamenhof, kaj jam de la komenco de la jaro estas antaŭvidataj diversaj agadoj. En Madrido la unua planata aktivaĵo okazos komence de februaro, la 2-an je la 7-a vespere, kun prelego en la kultura centro Casa Sefarad, en la strato Mayor, pri la figuro de la iniciatinto de Esperanto kaj lia rilato al la juda kulturo. Ni precizigos la informojn en posta komuniko, sed dume bv. noti la daton en via agendo.

Ni baldaŭ informos pri ekspozicio pri Esperanto en Madrido, okaze de tiu Jaro. La paneloj de HEF vojaĝos en januaro al Valencio, sed poste oni utiligos ilin en nia urbo. Ni informos ankaŭ pri ties detaloj, sed dume, se vi havas kontakton kun bibliotekoj, kulturaj centroj, institucioj, ktp, memoru ke eblas proponi al ili tiun agadon. Ja temas pri tre bona okazo.

Rezervu en via agendo ankaŭ la daton de la 6-a de februaro, kiam probable estos kunvokita la Ĝenerala Kunveno de Madrida Esperanto-Liceo. Anoj de la asocio ricevos la formalan kunvokon, sed dume notu la daton.

## MEMORIGO PRI (RE)KOTIZO

Al la membroj de MEL: estas tempo por pagi la jaran membro-kotizon por 2017.

Al la ne-membroj de MEL: se vi opinias, ke indas la ekzisto de loka asocio de madridaj esperantistoj, konsideru vian partoprenon en ĝi.

La kotizo por 2017 plu restas senŝanĝa (almenaŭ ĝis la sekva ĝenerala kunveno): 12 eŭroj. La konto de Esperanto-Liceo de Madrid estas IBAN: ES66 3183 2800 1700 0132 8957 en Caja de Arquitectos - Arquia. Metu vian nomon en la spaco "concepto".

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde post la 18,30. La unuasabata renkontiĝo okazos la 7-an de januaro en kafejo; bv. sendi viajn proponojn al madrid@esperanto.es.

Por esti informitaj pri novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la liston http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. Alia ebleco troviĝas en *Meetup*: http://www.meetup.com/Madrid-Esperanto-Conoce-aprende-practica-y-disfruta.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com